

Enketo de la ŝtato Neuchâtel pri la bezonoj de la junularo, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 536, 1974.01.16 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Oni multe parolas pri la junularo. Sed ĉu oni bone konas ĝin ? Ni raportis pri la organizo de grava enketo, kiu tuŝis en 1971 sep procentojn de la junularo 16-20-jaraĝa de la kantono Neuchâtel. La proporcio de la demanditoj respegulas la ĝeneralan socian situacion de la samaĝa junularo, el tio la valoro de tiu enketo, kiun gvidis sociologo kaj statistikisto, kiun subvenciis la Registaro kaj kiu ricevis la kunlaboron de multaj organizaĵoj, inter kiuj junularaj societoj.

A.- Laŭ la rezultoj de tiu enketo ni priskribos hodiaŭ la sintenon de la neŭŝatela junularo rilate al la **sportoj, hobiaj kaj kulturo.**

Cl.- Ekster la deviga gimnastika instruado la gejunuloj meze dediĉas po 3 aŭ 4 horojn semajne al la sportado. La plej praktikataj sportoj estas la skiado kaj sketado : 35 procentoj, naĝado : 20 procentoj kaj futbalo : 10 procentoj. Vi sciu, ke la kantono Neuchâtel estas montara kaj laga regiono.

A.- La sportaj aktivecoj disvolviĝas ekstere de la familio, ĝenerale en sportaj grupoj aŭ societoj.

Cl.- Ni nun transiru al alia okupo : rigardado de filmoj en kinejoj. 15 procentoj de la gejunuloj neniam iras al la kinejo. 70 procentoj iras tre regule. Ili tion faras ĝenerale en grupoj gekamaradaj, neniam en familio. Ĝenerale la gejunuloj iras po unu fojon en la kinejo semajne.

A.- Koncerne la legadon tiu enketo montras, ke 10 procentoj de la gejunuloj neniam legas libron. La normo de la legado estas po 4 horoj semajne. 15 procentoj legas pli ol unu horon ĉiutage.

Cl.- Kion ili legas ? Unue viciĝas libroj aventuraj kaj klasikaj : 45 procentoj. Sekvas spionaĵoj kaj policaj romanoj. La studentinoj pli ol 18-jaraĝaj vere fakiĝas en la legado de romanoj kaj klasikaĵoj.

A.- Krome la gejunuloj ankaŭ legas taggazetojn : Knaboj : 60 procentoj, knabinoj : 40 procentoj. La metilernantoj pli ofte legas gazetojn, ol la studentoj. La duono de la junularo regule legas periodaĵojn.

Cl.- La televido ludas grandan rolon en la nuna vivo. Tamen 20 procentoj de la gejunuloj ne rigardas la televidon. Montriĝas, ke la rigardado malkreskas kun la aĝo. Normoj : sub 18 jaroj : po 5 h 30 semajne ; pli ol 18 jaroj : po 3 horoj 30 semajne. 15 procentoj de la studentoj dediĉas pli ol 2 horojn ĉiutage al la rigardado de la televido. La ĝenerala normo por la rigardado de la televido estas po 4 horoj 30 semajne. Tiu rigardado disvolviĝas en familia etoso.

A.- La prefero por la elsendoj viciĝas tiel : filmoj kaj teatraĵoj : 65 procentoj ; varieteaj elsendoj : 25 procentoj. La knaboj ankaŭ ŝatas la informadon, la politikajn, sociajn, ekonomikajn kaj sciencajn elsendojn, dum la knabinoj donas sian preferon al la kulturaj elsendoj. La religiaj kaj junularaj elsendoj ne havas rigardantojn : nul procento.

Cl.- La gejunuloj aŭskultas la radion meze je po 8 horoj semajne, tio ĉefe por aŭskulti muzikon. Estas dufoje la tempo dediĉita al la legado. Laŭ la respondoj oni konstatas, ke temas antaŭ ĉio pri la kreado de brua etoso. La prefero iras al la pop-muziko : 35 procentoj, tuj poste viciĝas la klasika muziko : 15 procentoj, la ĵaz-muziko : 10 procentoj kaj fine la leĝera muziko : 5 procentoj. La gejunuloj ne kutimas aŭskulti aliajn radio-elsendojn.

A.- Kiam oni parolas pri la hobbio de la gejunuloj, oni ofte pensas al la drogoj. 15 procentoj de la konsultitaj gejunuloj foje gustumis drogon. Sed tio estas antaŭ ĉio knaba fenomeno : knaboj : 20 procentoj, knabinoj : 10 procentoj, kaj studenta fenomeno : inter la 11 regulaj drog-konsumantoj tiam registritaj, 10 estis studentoj pli ol 18-jaraĝaj.

Cl.- Mariĥuano kaj haŝiŝo estas la plej ofte uzataj drogoj : 61 procentoj. Sekvas amfetaminoj, ISD, meskalino : 24 procentoj ; opiumo, morfino, heroino : 9 procentoj.

A.- Inter kiuj foje drogiĝis, oni ricevis tiujn ĉi respondojn pri la kialo : 55 procentoj pro scivolemo ; 20 procentoj por akriigi la imagpovon kaj estetan senton ; 10 procentoj pro ne precizigita kaŭzo, alia 10 procentoj por forgesi la momentajn personajn malfacilaĵojn, 5 procentoj pro la socia premo de la kamaradoj. Fakte inter la scivolemo kaj la socia premo ekzistas malfacile difinebla limo.

Cl.- Tiuj, kiuj neniam konsumis drogon, donis tiujn ĉi kialojn : Manko de envio : 55 procentoj, pro la san-protekto : 10 procentoj, pro timo poste ne povi halti : 5 procentoj, pro manko de ebleco : 5 procentoj. 75 procentoj de la gejunuloj opinias, ke devus ekzisti informa centro pri la drogoj, kaj 80 procentoj, ke en la lernejoj oni devus atentigi la gelernantojn pri tiu problemo.

A.- Tabako kaj alkoholo ankaŭ ludas gravan rolon en la vivo de la gejunuloj. La enketo tamen pruvis, ke 30 procentoj de la gejunuloj neniam fumas kaj 15 procentoj preskaŭ neniam. La studentoj malpli fumas, ol la metilernantoj. 10 procentoj de la gejunuloj neniam konsumas alkoholaĵojn, 40 procentoj preskaŭ neniam. La knabinoj multe malpli konsumas alkoholaĵojn, ol la knaboj, dum por la fumado la normoj estas samaj. Montriĝis, ke 5 procentoj de la gejunuloj ebriiĝas almenaŭ unufoje en la monato.

Cl.- La gejunuloj bezonas monon. 1 junulo je 4 ne ricevas poŝmonon de la gepatroj. La norma monsumo ricevata varias inter po 10 kaj 50 svisaj frankoj monate, kio estas tute normalaj sumoj.

A.- 55 procentoj de la knaboj kaj 35 procentoj de la knabinoj laboras po kelkajn horojn semajne por akiri salajreton. Ili tiam gajnas inter 100 kaj 200 frankojn en la monato.

Cl.- La venontan semajnon, sur la bazo de la sama enketo pri la junularo en la kantono Neuchâtel, ni vidos, kio estas la situacio de la gejunuloj rilate al la religia kaj politika vivo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!